EL SCIENCOJ

INTERESAJ
KAJ/AŬ GRAVAJ
NOVAĴOJ

## ALKOHOLISTOJ KAJ NARKOTISTOJ RESANIGITAJ PERE DE NOVA CERB-OPERACIO

Nova kirurg-operacio laŭvorte forbrulas el la cerbo de alkoholistoj kaj narkotistoj iliajn emojn.

"Ĝis nun ni estas havintaj eĉ ne unu malsukceson", diras la fama cerb-kirurgo el Okcidenta Germanio, D-ro Fritz Roeder, 67-jara. "Ne ekzistas ia dubo en mia menso ke ĉi tiu operacio povas resanigi preskaŭ ĉiun alkoholiston aŭ narkotiston".

D-ro Roeder kaj lia "teamo" boras du etajn truojn en la supro de la kapo de paciento, kaj enŝovas du nadloŝimilajn elektrodojn en la hipotalamon (reguligilo de la apetitoj). La koncernantaj ĉeloj estas tiam brulataj de alt-frekvencaj elektrikaj impulsoj.

Laŭe diras D-ro Roeder: "Ni ne estas certaj kial, sed neniu el niaj pacientoj iam rekomencis uzi drogojn nek alkoholon denove. Tamen, ili konservas ĉiujn aliajn sensojn tute netuŝitaj. Ekzemple ili konservas la apetiton al manĝaĵoj, la ambicion kaj la sensojn de gustumado kaj de flarado.

Ekde 1972, D-ro Roeder estas sukcese operaciinta pli ol dekduon da alkoholistoj kaj narkotistoj en la fama Hospitalo Neu-Mariahilfe,de Goettingen, Germanujo, kie li estas la ĉefa neŭrokirurgo.

Inter liaj pacientoj estas homoj senditaj de juĝisto Gerhard Schleuss, kiu estas ankaŭ kuracisto kaj Medika Direktoro de la Krimaj Kortumoj de la regiono.

Laŭ la juĝisto Schleuss, "Mi estas sendinta alkoholistojn kaj narkotistojn por kuracado. Viro, kiun mi sendis la pasintan jaron, ŝajnis senespera kazo. Ne nur li estis alkoholisto, sed ankaŭ heroin-maniulo. Nun li resaniĝis kaj li estas utila membro de la socio kaj feliĉa parto de sia familio."

En Usono, D-ro Frederick W. I. Kerr, de la fama hospitalo Mayo,diris: "Mi kredas ke la laboro de D-ro Roeder kaj liaj kolegoj estas tre interesa. Ni nun koncentras nin en tiu laboro, sur simioj, sed niaj reserĉoj ĝis nun ne estas sufiĉe konkludaj por ke ni ankoraŭ laboru kun homaj pacientoj".

(Laŭ "National Enquirer" tradukis S.Docal)